**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1174 (20/2023)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana
Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.
**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm
**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it
**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf
**BIBLIOTECA DI MASSA**
https://reprobi.erasmo.it
**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice IVA **94006900024* (Gruppo E-ista Vercellese)**

*Indice articoli*

Risultati delle votazioni dell'assemblea del 30 settembre .......... 2
Incontro al Consolato Polacco .......... 3
Dislessia .......... 3
Monato .......... 3
Cos'è stato il Manifesto di Rauma .......... 4
Corso a Torino .......... 5
Dolĉas nia vivo per tio .......... 6
Raporto pri rondvojaĝo .......... 6
Ĉokolado kaj akuzativo .......... 9

## RISULTATI DELLE VOTAZIONI DELL'ASSEMBLEA DEL 30 SETTEMBRE

Cari/e *gesamideanoj*,
anzitutto ringrazio nuovamente tutti/e per l'impegno, la voglia di mettersi in gioco, l'assunzione di responsabilità nei confronti del movimento italiano e mondiale.
Grazie all'impegno di chi ci ha creduto fin da subito e fino in fondo: il *quorum* per l'approvazione del nuovo Statuto è stato ampiamente raggiunto.
Illustro di seguito i risultati delle votazioni di sabato 30 settembre 2023 a Bologna.

**Approvazione del nuovo Statuto:**
aventi diritto 484
votanti 279
(presenti 78 – per delega 201)
SI 264
NO 8
bianche 4
nulle 3

**Relazione Morale:**
aventi diritto 484
votanti 315
(presenti 77 – per delega 156 – per lettera 82)

SI 208
NO 20
bianche 41
nulle 46

**Bilancio:**
aventi diritto 484
votanti 315
(presenti 77 – per delega 156 – per lettera 82)

SI 207
NO 18
bianche 44
nulle 46

**Consiglio Nazionale:**
***Eletti***
Laura Brazzabeni 176
Gianantonio Pfleger 175
Enrico Borrello 165
Anna Carrera 148
Aldo Foà 145
Alessandro Bellucci 142
Michela Concialdi 136
Riccardo Pinori 136
Brunetto Casini 127
Ippolita Lustri 126
Ruben Conti 125
Andrea Montagner 125
Luigi Fraccaroli 123
Debora Rossetti 123
Massimo Ripani 117
Paola Nigrelli 109
Norberto Saletti 107

***Non eletti***
Francesco Amerio 102
Paolo Scotti 94
Alessandro Perna 93
Pier Luigi Cinquantini 84
Ugo Tonini 79
Alessandra Madella 76
Giuseppe Pascucci 56
Paola Tosato 45

bianche 0
nulle 3

**Revisori dei conti**
Tina Raciti 205
Alessandro Amerio 169
Alessandro Sarno 154

bianche 0
nulle 0

Auguro ai nuovi consiglieri e revisori un luminoso futuro carico di impegni e responsabilità.

*Luigi Fraccaroli*
Presidente della Federazione Esperantista Italiana

## INCONTRO AL CONSOLATO POLACCO

Nel quadro di uno scambio europeo tramite la piattaforma Erasmus+, si è svolto un incontro, presso il Consolato Polacco di Firenze, tra il Console, i giovani polacchi e gli esperantisti. Ecco l'articolo

https://www.consolato-onorariofirenzepolonia.eu/blog/2023/10/11/lincontro-fra-il-console-barlacchi-il-gruppo-polacco-erasmus-e-gli-esperantisti-italiani/

## DISLESSIA

Ecco il link del video sul progetto Dislessia, trasmesso anche da Esperradio

https://youtu.be/erfmZg2JvCA

## MONATO

La tarifo de Monato en 2024 iomete altiĝos pro la afrankkostoj.
FEL donas al la legantoj la eblon ankoraŭ aboni kontraŭ la malnova tarifo de 2023, kondiĉe ke ili mendu kaj pagu al perantoj antaŭ la 15a de novembro 2023
Jen la tarifoj de 2023

MONATO surface:  65 EUROJ
MONATO aere:  + 3 EUROJ
MONATO rete: 36,40 EUROJ

## COS'È STATO IL MANIFESTO DI RAUMA?



## CORSO A TORINO



## DOLĈAS NIA VIVO PER TIO…

Trovita en itala vendejo, produktata en Nederlando.




## RAPORTO PRI RONDVOJAĜO EN GERMANIO KUN FULMA VIZITO AL MILANO

*Ni ne kutimas aprigi vojaĝraportojn, sed tiu ĉi estas io aparta: ne oftas rakontoj el homoj el Benino!*

De la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2023 en Torino (Italio) kaj de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto 2023 en Lijano Sabbiadoro (Italio), okazis respektive la 108a UK kaj la unua Komuna Kongreso de ILEI kaj TEJO.
Ĉar mi ricevis pli ol unu monatan vizon, daŭriĝis, postkongrese mia restado en Eŭropo per rondvojaĝo tra Germanio.
La rondvojaĝo, kiu komenciĝis la 12an de aŭgusto kaj daŭris 19 tagojn, kondukis min al Munkeno, Ŝverin, Dillenburgo, Frankfurto, Duisburgo, Drensteinfurto, Mjunster kaj Telŝte. Ĝin kunordigis D-ro Uli Ender, estrarano de la Germana Esperanto-Asocio, kiun mi tamen antaŭe tute ne konis. La unuan kontakton kun li ebligis André Weber, mia amiko el Ŝverin, tiel fariĝante ŝlosilpersono en tiu afero. Laŭ tio, kion mi spertis, la rondvojaĝon mi povas priraporti en tri punktojn, nome informado, turismo kaj amikeco. Jen detaloj:
**Informado**

Kiel estis planite, mi unue vizitis Munkenon kaj gastis ĉe Uli de la 12a ĝis la 14a de aŭgusto 2023. La 15an de aŭgusto, mi forvojaĝis al Ŝverin, la urbo kun 12 lagoj, kie atendis min André Weber. Post du tranoktadoj, mi forlasis Ŝverin la 17an de aŭgusto kaj alvenis al Dillenburgo post tuttaga vojaĝo. En tiu urbeto, mi estis afable akceptita de Georg Heinnemann, prezidanto de la Frankfurta Esperanto-klubo. Tie, mi deĵoris dum preskaŭ unu semajno kaj min sentis hejme. Du tagojn poste, ĝuste la 19an de aŭgusto, okaziĝis, en vilaĝo Langenhain apud Frankfurto, la tradicia somerfesto, fare de Frankfurta E-klubo, kun ĉirkaŭ 16 partoprenantoj. La eventon, mi neatendite partoprenis kun la helpo de Georg.
La 22an de aŭgusto, mi kunĉeestis la kutiman mardan klubkunvenon en Frankfurto kaj povis tranokti ĉe Reinhard Pflüger, mia tridekjara leteramiko. Tien, mi jam estis en 2001 kaj en 2015 postkongrese. La sekvan tagon, mi fiksis direkton por Duisburgo, kie gastigis min Andreas Diemel. La 24an de aŭgusto matene, li aranĝis, ke mi entrajniĝu por iri al Mjunster kun fulma halto al Drensteinfurto ĉe Guido Brandenburg, la estro de la Mjunstera Esperanto-Societo. Vespere, ni kuniris al Mjunster, kie mi prelegis.
Konsiderante ĉion ĉi supre, estas klare, ke temas pri renkontiĝo inter homoj de malsamaj kulturoj. Kiam alikontinentano, kiel mi el Benino, vizitas eŭropajn esperantistojn, tiuj-ĉi estas emaj informiĝi kaj tiel fariĝas scivolemaj. Interpersonaj kaj grupaj babiladoj, konversacioj kaj klubkunvenoj ĉeestaj kaj perskajpaj rolis kiel informkanaloj. Tiel, de ĉie, fluis demandoj, preskaŭ similaj. Ili tuŝis mian profesian vivon kaj mian geedzan situacion, la Esperantan movadon en Benino, la geografion de Benino, la beninajn popolojn kaj iliajn lingvojn, la edukadan sistemon en Benino, endogenajn religiojn (Voduon ekzemple), alogenajn religiojn (Islamon kaj Kristanismon). Ne mankis demandoj pri la ĵus okazintaj UK kaj la komuna kongreso de ILEI kaj TEJO fare de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti.
Ekzemplodona estas la invito prelegi ĉeeste, fare de la Mjunstera Esperanta Societo, pri jam difinitaj temoj. La invito fontas el la fakto, ke ''ilia eŭrocentrisma perspektivo pri Afriko ĝenerale baras la vidon al teritorioj, lingvoj kaj popoloj de Afriko. Tiel ekzemple la mesaĝo ofte kaŭzas konfuzon, ke pri la restituo de Benin-Bronzoj ministerio por eksteraj aferoj ne intertraktis kun la registaro de la Respubliko de Benino, sed kun la orienta najbaro Niĝerio''. El mia prelego, ili sciis, ke la teritorio de la iama Benin reĝlando situas en la hodiaŭa Niĝerio kaj komprenis kial la tiel nomata germana ministerio tiel agas. Ili ankaŭ scias kiel Dahomeo alinomiĝis Benino en 1975 kaj plie pri la lokaj lingvoj parolataj en Benino. La okazo estis kaptita priparoli la projekton ''Lerni Esperanton per tipaj afrikaj lingvoj kaj afrikajn lingvojn per Esperanto'' kaj kelkajn lernolibrojn, kiujn mi verkis tiukadre. Temas, interalie, pri *''La Fongbea/Fonua en 12 lecionoj por Esperanto-parolantoj''*, *''ABC en la Joruba kaj en Esperanto''* kaj *''ABC en la Aĝaa kaj en Esperanto''*. Krome, la posttagmeza perskajpa klubo-kunveno okazinta la 25an de aŭgusto ĉefe ebligis al tiuj, kiuj ne povis partoprenis la fizikan prelegon pridemandi Beninon kaj diversajn aferojn. Kiam en Munkeno, kune kun Uli, mi spertis tian aranĝon

dufoje kun partoprenantoj el Sudkoreio (Azio) kaj Kongo-Kinŝaso (Afriko). Fakte, estis interesaj debatoj.  Je la fino de la prelego, Corinna, anino de la Mjunstera Esperanto-Societo, ofertis al mi du tranokteblecojn en Telŝte.

**Turismo**

La rondvojaĝo estis okazo malkovri turismejojn diversajn. Krom katedraloj kaj kasteloj kiel similaj vidindaĵoj por ĉiuj celitaj lokoj, pluraj aliaj memorejoj multfacetaj estis vizititaj dank al lokaj esperantistoj. Temas pri :

- En Munkeno,  la muzeo,kie arkiviĝas naziaj aktivaĵoj ĉefe en la dua mondmilito,  la angla ĝardeno, la olimpika ĝardeno, la ora anĝelo, la kastelo, la egibtia muzeo, la muzeo de la 5 kontinentoj, kie videblis ekspozicio de vico da antikvaj artaĵoj de Afriko, Azio, Ameriko, Eŭropo kaj Oceanio, la oktobra festejo kaj Esperantoplatz,
- En Dillenburgo, la nigra arbaro kun bestparko, la muzeo ‘’Villa Grün’’ kaj la Turo, en Mjunster (urbo de bicikloj), interalie, kvankam pluvetis, la urbodomo, kie mi subskribis la gastlibron kiel Esperantista Gasto.

En Ŝverin, la gesamideanoj Peter kaj Anita invitis André kaj min al unuhora boatveturado sur la Ŝverina lagoj, Hajdenze kaj Cigelze. Notindas,  ke  tre impresis min, en Ŝverin, la eksterordinare bela kastelo. Ĝi ja estas por mi neforgesebla memoraĵo. Ne mankis la vizito al Ausburgo improvizita de  Karl. Tie, eblis ĉefe vidi la urbodomon kaj la judan sinagogon kun muzeo.

Amikeco

La rondvojaĝo estis por  mi okazo ne nur revidi malnovajn amikojn sed ankaŭ renkontiĝi kun novaj vizaĝoj tiel pligrandigante mian amikecan rondon. Esperantisto ja estas amiko de ĉiuj. Ĉie, mi estis bone traktita. Mi  ŝatus uzi la okazon danki la Germanan Esperanto-Asocion, ĉefe Uli Ender pro lia preteco min plugasti kiam mankis gastiganto(j) por la lasta semajno de mia restado en Germanio. Miaj dankvortoj estas ankaŭ direktitaj al la Munkena Esperanto-klubo pro mondonacoj ligitaj al parto de miaj rondvojaĝkostoj. Proprakoste, mi povis alvojaĝis Italien cele ĉeesti la 108an UK-n. Konfesindas tamen, ke  mia partopreno en la komuna kongreso de ILEI-TEJO ne eblus sen la mona subteno de Andrė Weber, mia karega amiko, al kiu apartan dankon.

Mjunsteron,  mi forlasis la 26an de aŭgusto kaj devis, refoje, gasti ĉe Uli Ender ĝis la 30an de aŭgusto en Munkeno, de kie mi, je la 18:30, per Flix-Bus, alvenis al  la internacia flughaveno de Milano  Malpensa, via Zuriko (Svislando),  la postan tagon je la 6:20 matene.Tiel finiĝis mia restado en Germanio.

**La Milana etapo**

Ĉar la aviadilo devis ekflugi je la 22:30 nokte, mi dumtage renkontiĝis kun Matilde Mantelli, membro de la Milana Esperanto-klubo. Priduskutante diversajn temojn, ni povis, piedirante, viziti nur la Katedralon, la galerion kaj la straton ‘’Buenos Aires’’.  Mi ege ĝojis pri tio. Vespere, Andrea Montagner, prezidanto de la Milana Esperanto-klubo, afable veturigis nin, per la propra aŭto, al la flughaveno kaj tie delikate helpis. Ververe, mankas al mi vortoj esprimi miajn dankojn.

La 1an de septembro 2023, je la 13a posttagmeze, la aviadilo surteriĝis ĉe la internacia flughaveno ‘’Cardinal Gantin’’ de Kotonuo. Fine, dankon al cxiuj

*Latifou GBADAMASSI,*
*BP 302 Lokossa (Mono)*
*République du Bénin*

## ĈOKOLADO KAJ AKUZATIVO

Onidire, ĉiu peco da ĉokolado kiun vi manĝas mallongigas vian vivon po 2 minutoj: mi faris la kalkulon, kaj rezultas ke mi mortis en la jaro 1671. Se la samo estus aplikita al nekorekta uzo de akuzativo, mi konas homojn kiuj mortis eĉ pli frue ol mi...